


la Espero

1990:6

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN



Pacon kaj
prosperon
dum tuta
1991

ANONCETOJ

Ciu linio kostas 10 kr. Malplej alta kosto 50 kronoj. Anoncetoj konsistas el maksimume dek linioj. Mendu ĉe la redaktanto.

Volas korespondi 25-jara polino pri pentroarto, literaturo, kulturo, turismo, naturo, ĝardenkulturo kaj lingvoj: S-ino Renata Stanek, ul. Polewki 16/11, PL-31831 Kraków, Pollando.

Dekdu okjaraj infanoj deziras korespondi: Fondaĵo Talento, Burdaörs, Pf 102, H-2041, Hungario.

55-jara tajpiliriparisto volas inter-ŝanĝi gastigojn: Aleksei Jegorov, P.K. 24, Kohtla-Järve-3, Estonio, Sovet-Unio.

35-jara polino deziras korespondi pri turismo, floroj kaj Esperanto: Krystyna Kucharzewska, Nieborza 36, PL-64-212 Siedlec, woj. Zielona Góra, Pollando.

32-jara polo deziras korespondi pri karateo, lingvoj, turismo, muziko: Adam Owczarek, Wechadłow 44, PL-28-412 Góry Pinczowskie, woj. Kieleckie, Pollando.

DONACOJ

Osvald Nicolaisen, Stockholm 100, Helena Lind, Göteborg 25. CG Ingestedt, Vällingby 100, Leif Nordenstorm, Luleå 300.

Klubo Cent: Gunnar Ringh, Skövde 100. Margit Levi, Päråd 100. Tore Gustavsson, Skövde 100. (Por 1991) Ljungby Esperantoklubb 100. (Por 1991)

SEF dankas pro la donacoj. Novaj kontribuoj estas bonvenaj al Svenska Esperantoforbundeto, poŝtĝiro 2012-3. Krom mono, EsperantoCentro volonte akceptas rabat-poŝtmarkojn.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoforbundeto

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzon och Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1990

Esperantoforbundeto

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 2012-3, Esperantoforbundeto

Medlemsavgift 1991: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsforbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Lilla Tolsered väg 2265, 425 42 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andréasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08-97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala

Enhavo

- 80 Vojaĝo al Tallinn kaj estonaj esperantistoj
81 Konatiĝo kun mondaj problemoj ĉe UN en Novjorko
82 Gastoj el Tomsk ĉe svedaj politikistoj Pripensinde
83 Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto
84 La Espero serĉas kunlaborantojn
85 Ĉu koboldo? (iom pri malnova konato...)
86 Antoni Grabowski: la dua post Zamenhof Krucvortengimo
88 TRA LA LANDO
Traduka programo Interlingvistiko en la Stokholma universitato
Sep nacioj en Karlskrona En kongreso de samseksemuloj
Luu 18-horan videokurson Semajnfina kurso en Skövde
89 TRA LA MONDO
Progreso en Pakistano Komenco en Albanio ... kaj en Malajzio Rumanio reviviĝas Koresponda lingvokurso
90 Kalendaro UEA kolektas poŝtmarkojn
91 RECENZOJ
Streĉa distraĵo en fuŝa traduko Bona libro pri bona lingvo Vjetnama interesaĵo
92 Ni ne peras korespondpetojn!

Prezidanto:

Esperanto en la nova Eŭropo

Ĝuste nun Eŭropo estas en rapida evoluo. Iom da ĥaoso regas, antaŭ ol oni kapablas solvi la multajn problemojn. FR Germanio kaj Germana DR iĝis Germanio, kun granda signifo por la estonta situacio en Eŭropo.

La tuta komplika liberiga proceso el Sovet-Unio de multaj landoj igas maltrankvilon en ĉefe la orienta parto de Eŭropo. En tiu liberiga proceso ankaŭ la lingvo estas enmiksita.

Vi ja legis pri la lingva situacio en Hungario. Tie la rusa lingvo ne plu estas deviga, kio signifas ke preskaŭ neniuj lernantoj volas elekti tiun lingvon. Multaj anstataŭe elektas la kombinton anglan/esperanton. Granda progreso por ni, ĉu ne? La Eŭropa Komunumo kun la plej multaj Eŭropaj landoj – ankaŭ ni! – baldaŭ estos realo, kun la kunfandita progressa grandlando Germanio meze. Ni jam rimarkis ke oni pli kaj pli uzas la germanan lingvon. Ĉu la angla lingvo perdos sian pozicion kiel tiel nomata "internacia lingvo"?

Kaj kiu anstataŭos? Nun ni havas grandŝancon! Ĉu ni estas pretaj kapti ĝin? Ĉu niaj rimedoj sufiĉas – personaj kaj ekonomiaj? Ĉu ni kapablas lerte enmerkati ĝin?

Dependas de mi kaj vi kaj la tuta esperantistaro ĉu ni nun sukcesos en tiu eventuala lingva ŝanĝiĝo!

Eŭropa Esperanto-Forumo

Mi ĵus ricevis raporton de la Eŭropa Esperanto-Forumo, okazinta en Pollando 23-an – 26-a de septembro. Tie oni decidis inter alie:

La Eŭropa Esperanto-Forumo alvokas la Esperanto-organizaĵojn pli intime kunlabori en la spirito de "internacia lingvo – internacia movado" por:

- disvastigi la globskalan pensmanieron por elformi tutmondan konscion de la homaro;
- uzi Esperanton ĉefe en turismo, ekonomia vivo kaj inform-interŝanĝo pri libroeldonado kaj aliaj kulturaĵoj;
- UEA pli aktive organizu la kunlaboron de la landaj kaj fakaj asocioj;
- la Centra Oficejo de UEA ankaŭ ekonomie kunlaboru kun la landaj asocioj.

La Forumo instigas la landajn asociojn pli aktive uzi la eblecojn de Esperanto en la ĝeneralaj ekonomia, komerca, medioprotekta kaj turisma kunlaboroj en la nova Eŭropo kaj atentigas la landajn asociojn krei financon bazon de sia aktiveco per profitdona agado.

Do, nenio nova, sed oni ja akcentas la kunlaborajn punktojn. Tre grave!

La forumo rekomendas ke la diversaj punktoj estu pritraktataj dum la proksimaj kunsidoj landaj kaj la estraro de SEF kompreneble sekvos tiun rekomendon dum sia agadkunsido meze de novembro.

Karin Lindquist

Vojaĝo al Tallinn kaj estonaj esperantistoj

Ni elektas kelkajn interesajn partojn de longa inspiriga letero pri vojaĝo de du svedaj esperantistinoj al la ĉefurbo de nia najbarlando Estonio:

Per la aŭto de Ahti ni kvinope ekis nian viziton en la ĉefurbo de nia najbara lando. Ni komencis per la ekstera parto de la urbo. La urbo estis neatendite vasta kaj verda kun multaj belaj malnovaj arboj aŭ preskaŭ arbaroj. Per gaja surprizo ni opiniis, ke Tallinn aspektas multe pli "okcidenta" ol ekzemple urboj en aliaj antaŭe socialismaj landoj. La granda antaŭurbo Mustamäe povus trovi ĝemelon eĉ en Svedio. La maron, kiu ĉiam donas apartan vivon al ĉemaraj urboj, ni ĝuis apud Piritta – la maron, kiu prezentis sin per la vasta sablostrando kaj per multkoloraj velŝipoj. Du historiaj lokoj, kiujn ni vizitis, estis unu de mezepoka historio kaj alia de nuntempa historio. Brigitana monaĥinejo, kiu per sia larĝa, alta muro gvidis niajn pensojn kaj sentojn al la mezepoko kaj al la tiama kunlaboro inter Estonio kaj Svedio. Ankaŭ ni kune multe parolis pri nuna kaj es-

tonta kunlaboro inter la esperantistoj en la du landoj – kaj ni serioze klopodos, ke kelkaj el la multaj interesaj ideoj realiĝu en ne tro fora estonteco. Ni povas ekzemple realiĝi intersanĝon de grupoj, ĉar grave estas por esperantistoj havi eblecon vojaĝi kaj viziti unu la alian. Nun ni ricevis multajn novajn geamikojn, kiujn ni ŝatus akcepti en nia lando.

Alia grava historia loko, kiun ni vizitis, estis la fama scenejo de la Kantfestivaloj – la grava loko de la paŝon post paŝo kreskanta memstaro – la kuraĝa agado, kiun ni emocie sekvis per nia televido. Kun kortuŝo ni staris antaŭ la impona scenejo kun ĝiaj 100000 sidlokoj diverskoloraj.

Dimanĉe ni promenis laŭlonge de la remparo, pasis Kik in de Kök kaj la Virgulinan turon. Visby kaj Tallinn similas unu la alian. En la Nevskij-katedralo nin renkontis incensodoro kaj flirtantaj flamoj de centoj de kandeloj. La pastro kantis per forta basvoĉo kaj gvidis la koruson per imponaj moviĝoj de la manoj. Ĉar neniu el ni svedoj partoprenis grek-ortodoksan diservon,

tiu ĉi momento en la katedralo forte impresis nin.

Post mango ni promenis supren laŭ Piik-strato kaj veturis al la redakcio de Ahti, kie Kerstin kaj mi estis intervjuitaj en la svedlingva kaj esperantlingvaj programoj de Radio Tallinn. Dum ni faris la programon anoj de la esperanto-klubo de Tallinn kolektiĝis por prepari kafon kaj ni estis invitataj al tre agrabla kunestado kun kafo kaj bongustaj kukoj.

Birgitta verkis
Kerstin tradukis

Vojaĝoj al Estonio


Tiuj, kiuj volas vojaĝi al Estonio, kontaktigu kun mi. Mi klopodos organizi intersanĝon, por ke ankaŭ estonoj povu viziti Svedion:

Kerstin Rohdin
Fack 142
579 00 HÖGSBY
Tel: 0491-20461



Turoj de
Tallinn
ĉefurbo de
Estonio

Konatiĝo kun mondaj problemoj ĉe UN en Novjorko



Alvenis alia interesa raporto pri stud-vojaĝo al UN. Ankaŭ de tiu ni povas prezenti nur parton:

Vojaĝis al Usono grupo de 31 personoj por studi kiel funkcias la laboro de UN. La plej multaj estis geinstruistoj. Ĉiu apartenis al iu loka UN-societo, aŭ, kiel mi, al societo, aliĝinta al UN-societo. La vojaĝo finis dujaran edukadon pri UN-scio kaj internacia laboro.

Ni lernis aŭskultante amason da prelegoj. Temis pri la Sekureca konsilio, pri la Komisiono pri malmado, pri diversaj subtenaj kaj protektaj organoj de UN. Bedaŭrinde multaj el ĉi tiuj prelegoj estis prezentitaj en angla lingvo sen traduko. Bedaŭrinde, ĉar montriĝis, ke neniuj en la grupo povis tute kompreni la enhavon de la prelegoj, kaj tiam ja estas malfacile ĝuste kompreni kaj antaŭ ĉio estas malfacile poste fari demandojn al la prelegisto. Tio estas bedaŭrinde, sed eble igis kelkajn pensi. Kiel funkcias la lingvoj en UN? Ĉu ĉiuj povas sekvi

la prelegojn aŭ ĉu ili sidas kiel ni en prelegoj sen vere kompreni kaj sen povo partopreni la debatojn?

Fakte ĝuste por studi la lingvan problemon en UN mi aliĝis al la kurso entute. Mi volis studi kiel praktike funkcias la interpretado kaj la lingvaj kontaktoj inter la delegitoj. Sed la lingva problemo neniam venis en nian tagordon pri studobjektoj en UN. Laŭdire oni ne havas prelegistojn pri tiu temo.

Sed, feliĉe por ni, pluraj prelegoj estis en sveda lingvo. Estas ja multaj svedaj UN-oficistoj en Nov-Jorko.

Estas esperige por la estonteco de la infanoj, ke 70 ŝtatestroj de la 161 membrolandoj vere venis al la Infana Kunsido de UN. Ĉiuj subskribis la konvencion pri Infanaj Rajtoj, malgraŭ ke ne ĉiuj ratifikis ĝin. I.a. oni havas kiel celon, ke ĝis la jaro 2000, do post dek jaroj, oni:

1. Reduktu la infanan mortokvanton per unu triono - nun mortas 40000 infanoj ĉiutage pro malsato kaj malsanoj;

2. Reduktu la patrinan mort-

kvanton per unu duono - nun ĉiun duan horon "terenfalas plena aviadilego" kun patrinoj, kiuj mortas dum akuŝado en la evolulandoj.

3. Laboru por ke 80% el ĉiuj infanoj en aĝo por elementaj lernejoj povu legi kaj skribi.

Dum la restado en Novjorko mi kompreneble vizitis la UEA-oficejon tie kaj renkontis anojn de la novjorka klubo. Bedaŭrinde ne eblis havi kontakton kun la esperantoklubo de UN. Mi nur salutis la prezidanton, sed en la UEA-oficejo mi informiĝis pri ilia laboro. Plurfoje mi renkontis gesamideanojn kaj dum gvidado en la urbo ni interŝanĝis informojn pri niaj landoj.

Dank' al ili mi povis montri al la aliaj en mia grupo, kiel bone funkcias nia kontaktreto kaj la lingvo mem. Pluraj en la grupo vere interesiĝis kaj petis informojn pri esperanto, dum kelkaj eĉ antaŭe sciis multe pri la lingvo.

Märtha Andréasson

Gastoj el Tomsk ĉe svedaj politikistoj

Inter Högsby kaj Tomsk estas longa vojo. Sed tamen post longa kaj intensa laboro tiu vojo estas "farita" de dek unu personoj el fora Siberio – dek unu junaj personoj, kiuj diversmaniere estas ligitaj al la universitato de Tomsk. Dum unu jaro tiu vojaĝo estas planita kaj la laboro kaj interkonsentoj plejparte estas faritaj nur per kelkaj telegramoj. La ĝojo estis des pli granda, kiam ni finfine ekvidis unu la aliajn en la nokto ĉe la aŭtobushaltejo de Högsby. Tiam ili jam faris tritagan viziton en Malmö, kie ili havis bonan restadon en hejmoj de diversaj esperantistoj, dank' al organiza helpo de Asta Schaedel kaj Leon Salomonsson. La Tomsk-anoj alportis al ni kulturan prezentaĵon en formo de profesiaj danco kaj kantado. Tion ili prezentis en multaj diversaj lokoj – lernejoj plejparte, sed ankaŭ dum internacia kulturifesto en biblioteko. Aleksandr Ŝljafer prelegis en diversaj medioj kaj lingvoj – esperanto, angla, rusa – pri la evoluo en Sovetunio, pri perestrojko, pri la esperoj, pri la estonteco ktp. En la lernejoj (plejparte popolaltlernejoj) la Tomsk-anoj renkontis multajn personojn el diversaj landoj, kaj ili multe interparolis – ankaŭ en diversaj lingvoj.

Ankaŭ en Högsby niaj siberiaj geamikoj loĝis en hejmoj – plejparte de neesperantistoj, kiuj per tiu vizito multe ekinteresiĝis pri internaciaj aferoj kaj pri esperanto. Multaj politikistoj eksciis pri esperanto kaj la urbestro invitis la siberianojn al lunĉo kune kun pluraj svedaj politikistoj.

Post unu semajno en Högsby plena de prezentaĵoj, vizitoj, festoj kaj amikeco, niaj amikoj vojaĝis norden al Värmland – al Filipstad, kun la fama Vasa-sekpano, kie Lenart Svensson aranĝis programon

por ili. Karlskoga popolaltlernejo kaj ĝia esperanto-kurso havis viziton kaj viziton kaj Lars Forsman aranĝis publikan programon. La lastajn tagojn ili prezentis en Norrköping sub la aranĝo de Haldo Vedin. En ĉiuj lokoj la esperantistoj per la diversaj prezentaĵoj pagis la vojaĝkostojn ktp. en Svedio. La Tomsk-anoj mem pagis la vojaĝon al Svedio.

En novembro de kunupersona grupo el Högsby intencas siavice viziti Tomsk-on. Estas la personoj, ĉe kiuj la sovetianoj loĝis kaj kiuj ekinteresiĝis pri Tomsk kaj esperanto.

Kerstin Rohdin

Pripensinde

Neniam portu pli ol unu malfacilon samtempe! Kelkaj homoj portas tri – malfacilojn kiujn ili havis, ĉiujn kiujn ili havas, kaj ĉiujn kiujn ili havos.

William Channing,
usona pastro

Bonaj vortoj vivas tra la vivo, kaj ili povas lumi tra jarcentoj, same kiel la lumo de la stelo, malantaŭ milionoj da lumjaroj atingas iun ajn kun la sama klareco.

E. Lindquist

Tiu, kiu kredas ke li ne bezonas aliajn homojn, trompas sin mem, sed tiu, kiu kredas ke aliaj ne povas malhavi lin, eĉ pli multe trompas sin.

Francois de la Rochefoucault

Annonsera i La Espero

Annonsera i *La Espero* enligt följande villkor:

Helsida	2 400 kr
Halvsida	1 450 kr
Fjärdedelssida	850 kr
2 spalter x 6 cm	500 kr

På ovanstående priser får esperantoklubbar och medlemmar 50 % rabatt.

Småannonser kostar tio kronor per rad. Lägsta kostnad är dock 50 kr. Högst tio rader per person och tidskriftsnummer. Annonser beställes hos redaktören.

La Espero en 1991

La eldondatoj por *La Espero* dum 1990 estos proksimume:

	<i>Limdato por materialo</i>	<i>Aperdato</i>
N-ro 1	18-a de januaro	27-a de februaro
N-ro 2	15-a de februaro	27-a de marto
N-ro 3	31-a de majo	10-a de julio
N-ro 4	16-a de aŭgusto	25-a de septembro
N-ro 5	13-a de septembro	23-a de oktobro
N-ro 6	18-a de oktobro	27-a de novembro

Memoru ke malfruaj manuskriptoj malfruigas la revuon.

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L. Zamenhof en 1905

N-ro 14 (Majo 1990)

PRI DERIVAĴOJ DE KOMUN/A: KOMUNUMO, KOMUNAĴO, KOMUNO

Komunumo: pro la evoluo tiu vorto prezentas hodiaŭ tri ĉefajn signifojn. Nome:

1. Plej eta teritorio organizita por la komunaj interesoj de siaj loĝantoj.
2. Kia ajn homa grupiĝo (loka, regiona, monda) prezentanta komunajn interesojn por siaj membroj.
3. Internacia grupiĝo de ŝtatoj kun komunaj interesoj.

Komunaĵo: lo komuna, punkto komuna al du aŭ pluraj personoj.

Komuno: tiu vorto neniel povas signifi komunumo 3 laŭ la ĉi-supra difino, por kiu signifo ĝi cetere ne havus specifan adjektivon.

La direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,
Bernard GOLDEN

La Prezidanto de la Akademio de Esperanto,
D-ro André ALBAULT

Kvar aferoj ne revenas: pafita sago, dirita vorto, perdita ŝanco kaj travivita vivo.

O. Ibu-Khattab

Tiu, kiu disjetas kudrilojn, atentu ke li ne iras senŝua.

Araba proverbo

Se la ŝtonepokaj infanoj estus obeintaj siajn gepatrojn, ni ankoraŭ vivus en la ŝtonepoko.

*Red Top,
sveda humoristo*

TRI KIALOJ MENDI LIBROJN:

- * *Ĝuu literaturon!*
- * *Plibonigu vian lingvokonon!*
- * *Eldona Societo bezonas monon por eldoni novan vortaron en 1991!*

Aniario (poezio)	83 kr
Antologio de maltaj poetoj	60 kr
Bona rido (anekdotoj)	10 kr
El la vivo de L. Zamenhof	6 kr
Inter sudo kaj nordo (rakontoj)	27 kr
Islandaj pravoĉoj (rakontoj kaj mito)	
bindita:	25 kr
broŝurita	19 kr
Jaroj sur tero, bindita	32 kr
broŝurita	23 kr
Kredo al Dio en la atomepoko	6 kr
Kredo, floroj, dinamito, bindita	27 kr
broŝurita	19 kr
Malŝata ŝtono (rakontoj)	48 kr
Mi serĉis oron kaj oleon, sed..., bind.	27 kr
broŝurita:	21 kr
Orm la Ruĝa	137 kr
Pasko (teatraĵo)	6 kr
Printempo de morto	21 kr
Ŝipestro rakontas, bindita	21 kr
broŝurita	11 kr
Tra lando de indianoj, bindita	34 kr
broŝurita	17 kr
Vivu la stel' (kantareto)	6 kr
Lernolibroj kaj vortaroj:	
Allas andra språk	35 kr
Ek!	50 kr
Esperantisk- Svensk ordbok	50 kr
Esperantokurs	27 kr
Etimologia vortaro A-D	81 kr
Internationelt språk (Den första läroboken i esperanto för svenskar)	100 kr
Jen nia mondo 1	50 kr
Jen nia mondo 2	70 kr
Lilla ordboken	60 kr
Lingva kvaronhoro	7 kr
Nyckel till den internationella språket	12 kr
Nya Esperantokompedium	72kr
Svensk esperantogrammatik	40 kr

Eldona Societo Esperanto
Box 7502, 200 42 MALMÖ

Från a till övärld

sträcker sig den nya ordboken
(svenska-esperanto),
som kommer ut under
första halvåret 1991.

Du kan beställa ordboken
redan nu
genom att betala
320 kronor
till postgiro 578 - 5,
Esperantoförlaget.

Ordboken kommer att omfatta
över 500 sidor i A5-format.

*Var en av de första
att få ett eget exemplar!*

Esperantoförlaget

LA ESPERO

Serĉas kunlabor- antojn

Nia revuo *La Espero* serĉas kunlaborantojn. Por fari bonan revuon mi, kiu redaktas *La Esperon*, bezonas helpon de multaj esperantistoj de nia lando. Ĉiuj esperanto-kluboj, kiuj havas revuon, povas sendi ĝin al mi por ke mi povu ĉerpi informojn pri esperanto-agado en la lando. Vi ankaŭ povas informi min pri okazintaĵoj kaj okazontaĵoj. Skribu mallongan raporton! Mi tre ofte devas mallongigi la longegajn.

La Espero bezonas libro-recenzantojn. Se vi ŝatus post interkonsento ricevi librojn, tralegi ilin kaj skribi kelkajn liniojn pri ĝi, sciigu min pri viaj intereso: prozo, poezio, scienco, filozofio, historio, religio, politiko ktp.

La Espero bezonas temajn artikolojn pri ĉiutagaj aferoj, scienco, lernejoj kaj aliaj temoj. Skribu pri via fako aŭ intereso kaj donu la svedan tradukon de malfacilaj vortoj.

La Espero bezonas facilajn tekstojn por komencantoj. Se vi aranĝis kurson kaj verkis facilajn, interesajn tekstojn por komencantoj, sendu ilin al mi.

La Espero bezonas ankaŭ anekdotojn, desegnaĵojn kaj fotojn.

Iam mi bezonas helpon de personoj, kiuj ŝatus traduki en esperanton el la sveda aŭ inverse.

Sed, ni jam ricevas tre multajn poeziaĵojn. Do, ni ne bezonas pliajn. Pli bone estas sendi poeziaĵojn al la beletraj revuoj.

Viaj kunlaboraĵoj estos bonvenaj. Skribu ankaŭ se vi pretos kunlabori, ekzemple recenzi aŭ traduki post ĉiufoja interkonsento.

Leif Nordenstorm
Munkebergsgatan 38, 3 tr
951 56 LULEÅ

Ĉu koboldo? (iom pri malnova konato...)

Ĉi-foje la rubriko devus esti "Ĉiujara Esperanto", ĉar la temo estas kristnaska. Kristnasko estas interalie la sezono de donacoj. En Svedio estas la tiel nomata "Jultomten", kiu venas kun donacoj. Svedaj esperantistoj kutimas nomi lin "la Kristnaska koboldo" laŭ la sveda nomo. Sed ĉu taŭgas rekta traduko el la sveda? Eble estas necese rigardi tiun figuron per internaciaj okuloj.

La tuta historio komenciĝis jam en la kvara jarcento, kiam vivis en Malgranda Azio certa episkopo, kiu nomiĝis Nikolao. En la jaro 933 li estis kanonizita kaj eknomiĝis Sankta Nikolao. Lia mortotago, la sesa de decembro, fariĝis lia memortago. Ekzistas pri li multaj legendoj. Interalie li iam per preĝoj savis ŝipon de forta ŝtormo. Tial Sankta Nikolao estas la protektanto de ĉiuj maristoj.

Laŭ aliaj legendoj li estis tre helpema kaj speciale amis infanojn. Li eĉ revivigis mortintajn infanojn. Li tial fariĝis protektanto ankaŭ de la infanoj. La imago de Sankta Nikolao kiel donacanto eble naskiĝis en monaĥejaj lernejoj, kie la sesa de decembro estis grava ekzamentago. Post la ekzameno monako alivestita kiel Sankta Nikolao donis frandaĵojn kaj donacojn al la bonaj lernantoj kaj riproĉis la malsukcesintojn.

La donacokutimo disvastiĝis ekzemple en Germanio, kie Sankta Nikolao tamen devis konkurenci kun la Kristinfano kiel alportanto de donacoj. La protestanta eklezio preferis la Kristinfanon al katolika sanktulo, sed la popolo miksis ilin en siaj kutimoj. Sankta Nikolao ekhavis multajn nomojn kaj aspektojn. Interalie oni nomis lin la Kristnaska viro, sed en ekzemple Nederlando

li venas en sia propra tago, la sesa de decembro, akompanate de sia servisto Nigra Peĉjo, kaj portante ankoraŭ sian episkopan veston. Aliloke li tamen ekhavis peltan mantelon kaj ĉapon. Nederlandanoj portis Sanktan Nikolao en



Usonon, kie li tre populariĝis. En Rusio, Petro la unua proklamis en 1700, ke oni festu novjaron kun donacoj alportataj de Avo Frosto, kiu estas Sankta Nikolao kun ankoraŭ nova nomo.

Nikolao venis kompreneble ankaŭ al Nordio, kie li tamen konfuziĝis kun niaj koboldoj. Koboldo estas supernatura estaĵo, kiu vivas en montoj, minoj aŭ en bieno, kiun li protektas. La sveda vorto "tomte" ja devenas de la vorto "tomt" (domgrundo). En Danio li nomiĝas "Nisse" (Niĉjo), kio eble kreis la

konfuzon kun Nikolao. Sankta Nikolao estas ja sufiĉe malsimila al nia tradicia norda koboldo, kiu neniam estis donaculo, sed ofte eĉ timata estaĵo. Antaŭe la transdono de donacoj estis prizorgata de la Kristnaska Boko (virkapro), aŭ eĉ la Kristinfano. En Finnlando oni ankoraŭ uzas la nomon Kristnaska Boko al la donacportanto, kiu ne plu estas boko, sed refoje la sama Sankta Nikolao.

La demando estas: Kiel nomi lin en Esperanto? Li estas, kvankam iom varianta laŭ nomo, aspekto kaj kutimoj, sufiĉe unueca internacia figuro. Nomi lin koboldo certe estas strange. Unue nur skandinavo tiam komprenas, due li ja tute ne estas koboldo. Ankaŭ estas iom nekonvene nomi lin Kristnaska viro aŭ Patro Kristnasko, ĉar en kelkaj landoj li tute ne venas kristnaske, sed la sesan de decembro aŭ novjare. Nomoj kiel Avo Frosto aŭ Patro Vintro ktp povas esti eblaj, sed plej bone estas laŭ mi reveni al la fonto, nomante lin Sankta Nikolao, ĉar tiu nomo estas sufiĉe konata en multaj landoj. En sia usona aspekto li disvastiĝis tutmonde, eĉ al landoj, kie oni normale ne festas kristnaskon.

Kompreneble tiu figuro indas je multaj kromnomoj, kaj oni ne limigu sin al la longa formo Sankta Nikolao. Eblas nomi lin ankaŭ ekzemple Sankta Niĉjo, Sankĉjo ktp, laŭ propra fantazio.

Ĉiuokaze mi deziras al vi ĉiuj
Ĝojan Kristnaskon!

Bertilo Wennergren

Antoni Grabowski: la dua post Zamenhof

Cu vi iam aŭdis aŭ legis la nomon Grabowski? Se vi iom studis la historion de Esperanto, vi verŝajne scias ke Grabowski ne estis la dua esperantisto post Zamenhof, sed eble la dua homo, kiu sciis paroli Esperanton, kaj kiu verkis en la lingvo.

Antoni Grabowski naskiĝis en la germana parto de Polujo en 1857 – en tiu tempo Polujo ne estis libera lando, sed partoj de Germanujo, Rusujo kaj Aŭstrujo – kaj mortis en Varsovio en 1921. Li estis sciencisto pri hemio, kaj verkis sciencajn librojn. Ankaŭ pri lingvoj li estis sperta. Li lernis ĉirkaŭ tridek diversajn, ankaŭ Volapukon. Volapuko estis antaŭulo de Esperanto, alia in-

ter-nacia lingvo, kiun kreis la germano Schleyer. Grabowski opiniis ke Volapuko estas tre malfacila lingvo, sed tamen lernis ĝin ĉar li opiniis ke la mondo bezonas mondlingvon. Tamen kiam li vizitis Schleyer-on, kaj rimarkis ke eĉ li, kiu mem faris la lingvon, parolas ĝin tre malbone, li fine komprenis ke Volapuko estas tro malfacila.


Kiam aperis la unua esperanta lernolibro de Zamenhof, Grabowski kaj multaj aliaj volapukistoj, tuj for-lasis Volapukon, kaj lernis la novan facilan internacian lingvon Esperanto. Baldaŭ li sendis al Zamenhof sian unuan tradukon al Esperanto: *Neĝa' Blovado'* de la rusa verkisto Puŝkin. Baldaŭ renkontiĝis

la du kaj okazis la unua inter-parolo en Esperanto.

Dum kelkaj jaroj Grabowski estis unu el la homoj, kiuj volis ŝanĝi Esperanton. En 1894 oni tamen decidis ke Esperanto restos sen ŝanĝoj, kaj Grabowski akceptis la decidon. Li multe laboris por informi pri Esperanto. En 1904 fondiĝis Pola Esperanto-Societo kaj Grabowski fariĝis ĝia unua prezidanto.

Dum la unua mondmilito (1914-1918) li devis for-lasi Varsovion, kiu estis en la rusa parto de Polujo, ĉar li devenis de la germana parto. Dum la milito la germanoj okupis Varsovion, kaj Grabowski povis reveni al sia hejmo. Liaj familianoj tamen foriris al Rusujo. Sola hejme, en la

KRUCVORTENIGMO



Horizontale:

1. Tenas rok-kantisto en la mano
2. Sendas
3. Malgrandaj ŝteladoj
4. Redono – Itala monunu'
5. Ĉu omleto?

6. Bonfart' – Endormigi (radiko)

7. Finaĵo por futuro –
Ĉiu havas ... nomon
8. Sub butero (r) – Muzikteatraj
9. Adorata person' – Subtene
10. Sveda monero – Pagilo

Vertikale:

- A. La homaro
- B. Songas – Prepozicio
- C. Broĉon sen pinglo –
Truet' en la haŭto
- Ĉ. Akordadas kiel malnovaj
poemoj – Malaltigilo
- D. Strutmetaĵon
- E. Malbonodoras – Korinklin'
- F. Altvalora metalo –
Malpli ol kvar kune
- G. Tion celas la martelo
- Ĝ. Meze en roso –
Lago sude de la Blanka Maro
- H. Malgranda grup' – Muziknoto

Kompilis: Lennart Persson

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	O	N	D	U	K	T	O	R	A
2	R	■	U	R	N	■	E	L	I	T
3	O	R	D	I	G	A	S	■	S	U
4	K	O	A	L	O	■	T	A	K	T
5	O	M	■	O	N	D	A	R	O	■
6	D	A	M	■	■	O	M	E	N	O
7	I	N	A	R	O	■	E	N	■	K
8	L	E	T	E	R	O	N	■	E	A
9	A	T	E	N	D	A	T	A	J	■
10	S	■	O	■	O	Z	O	N	O	N

Solve de la enigmo en *La Espero* 1990:5

malplena domo, li finis la tradukon de *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz, pola poezia verkego, tut-libra poemo, kiu rakontas pri la vivo de pola familio. Tiu ĉi libro fariĝis unu el la klasikaĵoj de la esperanta literaturo. En *Sinjoro Tadeo* Grabowski uzas 209 novajn esperantajn vortojn, kiujn oni antaŭe ne uzis. La plejmulto el ili nun estas konataj vortoj de la lingvo.

Grabowski estis unu el la plej grandaj verkistoj kaj tradukistoj de la esperanta literaturo. Sola kaj malsana, li havis nenion por fari krom verki, traduki, kaj viziti Zamenhofon, al kiu li ofte legis siajn verkojn. Post la morto de Zamenhof en 1917 li fariĝis eĉ pli sola. En 1921 li mortis pro kor-atako, kiam li rigardis esperantajn librojn en monstro-fenestro.

La esperantistoj ĉiam memoros Grabowski-n pro liaj propraj verkoj kiel ekzemple la poemo *Tagiĝo* kaj tradukoj kiel la poemkolekto *El Parnaso de Popoloj* kaj kompreneble *Sinjoro Tadeo*.

Leif Nordenstorm

Elparolo de nomoj:

Grabowski: grabovski

Schleyer: ŝlajer

Mickiewicz: mickieviĉ

Hemio: la scienco pri diversaj substancoj

Neĝo: akvo dum malvarma vintro

Blovi: la vento blovas

Konata: fama; tia, ke homoj konas lin

Kor-atako: subita malsano en la koro

Parnaso: la hejmo de la dioj kaj la poezio, laŭ la pratempaj grekoj

Tiu ĉi artikolo pri Grabowski aperis en *Kontakto* 109 (1988:3). Ĝi estas ekzemplo de facillingva artikolo, facile komprenebla por komencantoj. Kontakto regule enhavas facillingvajn artikolojn. Komencantoj abonu ĝin. Vidu paĝon 85.

En liten påminnelse

Dags att prenumerera!

Prenumerera på en eller flera esperantotidningar, så får du veta vad som händer i esperantovärlden och tränar samtidigt språket.

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Skriv bara på talongen vilken eller vilka tidningar du avser. Priserna gäller för 1991.

Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Bulgara Esperantisto	110 kr
El Popola Ĉinio, 1 år	90 kr
El Popola Ĉinio, 2 år	150 kr
El Popola Ĉinio, 3 år	210 kr
Enigmo (ny tidning med korsord mm)	145 kr
Fonto	110 kr
Heroldo de Esperanto	135 kr
flygposttillägg	25 kr
ICEM Esperanto	90 kr
Infana klubo, 1 ex	45 kr
Infana klubo, 2-4 ex till samma adress	25 kr/ex
Infana klubo, 5-9 ex till samma adress	17 kr/ex
Juna amiko	30 kr
Kontakto	80 kr
Kulturaj Kajeroj	80 kr
La Espero el Koreio	60 kr
La Jaro (årskalender)	30 kr
flygposttillägg	10 kr
La Kancerkliniko	120 kr
La Letero de l' Akademio de Esperanto	140 kr
La Ondo	60 kr
(ny sovjetisk tidning, osäker utgivningsstart)	
Literatura Foiro	165 kr
Monato	200 kr
flygposttillägg	45 kr
Norvega Esperantisto	60 kr
Oomoto	60 kr
Paco	70 kr
TEJO-tutmonde	55 kr
Scienca Revuo (2 nr/år)	25 kr
Vietnamio	45 kr

Enligt färskta uppgifter har Hungara vivo och Fokuso upphört att komma ut. Enigmo och Vietnamio är nya sedan i fjol.



Traduka programo

La esperantisto Tore Edler pretigis komputilan tradukprogramon, Trans S-E, kiu tradukas el la sveda en esperanton. Ĝi estas malpli komplika ol la nederlanda DLT-projekto, kaj uzas esperanton sen modifi ĝin.

Trans S-E estas uzebla ankaŭ por ekzerci esperanton. La konstruinto prelegis pri la programo en Karlskoga Popolaltlernejo, kaj la tiea esperanto-instruisto Lars Forsman tuj spertis pli altan temperaturon. Multaj volis informiĝi pri esperanto.

Interlingvistiko en la Stokholma universitato

En 1991 denove komenciĝos kurso pri interlingvistiko en la lingvistika fakto de la Stokholma universitato. La kurso temas pri lernado de dua lingvo, piĝinaj lingvoj kaj kreoligo de lingvoj, planlingvoj laŭ diversaj aspektoj. La studantoj ankaŭ lernas iom kompreni esperanton kaj interlingua-n.

Inter la lernolibroj troviĝas *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* kaj *Svensk Esperanto-grammatik*.

La kurso estas kvinpoenta, t e kvaronsemestra.

Sep nacioj en Karlskoga

La 22-an de oktobro komenciĝis nova kurso por progresantoj en la popola alternejo en Karlskoga. La studantoj venis el sep landoj: Danio, Norvegio, Finnlando, Estonio, Ĉeĥoslovakio, Germanio kaj kompreneble nia lando. 17-jara

germanino ricevis libertempon de sia gimnazio por studi Esperanton en Karlskoga.

Alia afero pri "nia" popola altlernejo en Karlskoga. La 10-an - 15a de junio 1991 ne nur estos kutima somera kurso. La lernejo invitos ankaŭ lingvoinstruistojn de gimnazioj kaj mezlernejoj lerni Esperanton kaj instrumentodikon. Cetere kvin someraj tagoj estas devigaj por studado por instruistoj.

En kongreso de samseksemuloj

Somere okazis en Stokholmo konferenco de Internacia Lesba kaj Geja Asocio. (gejo= samseksemulo) Partoprenis 252 delegitoj el 31 landoj, el kiuj ses estis esperantistoj el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Italio kaj Svedio.

Kun miro la neesperantistoj konstatis ke la esperantistoj flue parolis unu kun la aliaj, kvankam unu parolis esperanton nur dum unu jaro. Multaj el la ceteraj konferencanoj bone parolis la anglan, sed ne tute flue...

Luu 18-horan videokurson

Sveda Esperanto-Instituto aĉetis videokurson de Internacia Esperanto-Instituto en Haag. Ĝi konsistas el 6 bendoj kun 18-hora programo, kaj estas produktita kunlabore kun Audrey Childs-Mee.

La celo de la bendoj estas prezenti modelon de moderna variaĵo de instruado per la Cseh-metodo. Laŭ IEI nur kompetentaj instruistoj uzu la bendojn, unuavice por eduki studgvidantojn de la Cseh-metodo. Sed kompreneble ankaŭ aliaj povas utiligi la kurson.

Al la kurso apartenas skribaj priskriboj pri la uzo de la bendoj.

Tiu materialo bedaŭrinde ne estas preta, ĉar Audrey mortis ĉi-somere, antaŭ la finpretigo de la materialo.

La lukosto de ĉiu bendo estas 50 kronoj monate plus sendokostoj. Oni tamen devas deponi 500 kronojn dum la luado. Mendu pagante 500 kronojn al la poŝtĝirkonto 51511-4. Ni sendos la unuan bendon. La duan vi ricevos post resendo de la unua. Post la resendo de la lastas bendo, ni repagos la restantan depopagon.

Informas:

Sveda Esperanto-Instituto,
p/a Märtha Andréasson,
Lilla Tolsereds väg 2265,
425 42 Hisings Kärra
Tel. 031-571133.

Semajnfina kurso en Skövde

La kurso en Skövde allogis proksimume 60 gestudentojn el diversaj lokoj en suda Svedio. La komentantaj grupoj estis plenplenaj.

La partoprenantoj diris, ke ili devis multe laborigi siajn cerbojn la tutan tempon. Sed post la fino de la intensivaj du tagoj ili sentis, ke la laboro vere valoris la penon.

En la konversacia grupo s-ino Frisk donis al ni multajn matematikajn problemojn por solvi, kun pli aŭ malpli bona rezulto.

Tiu ĉarma virino ne nur bone instruis, ŝi ankaŭ scipovis baki tre bonan panon, kiun ni ĉiuj ĝuis je la lunĉo.

Multaj aliaj personoj de la klubo en Skövde treege laboris, por ke la kurso estu tiu sukceso, kiu ĝi fakte estis.

Kiel unu el la ĉeestintoj en la semajnfina kurso mi volas doni cent ruĝajn rozojn al la Skövde-klubo.

Barbro Haraldsson

Progreso en Pakistano

Prosperas la esperanto-agado en Pakistano. Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) aranĝis tritagan someran kunvenon. Parolis esperante eĉ malgrandaj infanoj. La organizaĵo ankaŭ komencis publikigi propran revuon kun la nomo "Esperanto".

Komenco en Albanio

Ekde 1990 aperas la nomoj de du albanaj delegitoj en la jarlibro de UEA. Tio estas modesta sed esperiga signo ke ni havos kontaktojn ankaŭ kun la esperantistoj en tiu lando.

Alia esperiga signo estas letero, kiun ricevis Progreso Eldonejo de albana esperantisto. Li ŝatus traduki Pipin Strumpolongan en la albanan, kaj tial petas ekzempleron de la esperanta eldono.

... kaj en Malajzio

En 1989 la polo Joachim Werdin vizitis kelkajn landojn en Azio, kie ĝis tiam ne ekzistis esperanto-movado, por propagandi la lingvon. En Malajzio li donis kelkajn lecionojn al dek sep personoj. Unu el la lernantinoj, Chan Sook Wai, daŭrigis siajn studojn, ĉiutage parolante esperanton telefone kun alia komencanto. Jam en 1990 ŝi faris trimonatan prelegvojaĝon en Pollando, prelegante pri sia hejmlando Malajzio en esperanto, kvankam ne perfekte regante la lingvon.

Reveninte al Malajzio Chan Sook Wai gvidas kurson pri esperanto. Ŝi ankaŭ daŭrigis la prelegadon, nun pri sia vojaĝo en Pollando, kaj verkis plurajn gazetartikolojn. Dank' al la laboro de kelkaj sentimuloj, kiuj ne timas neplugitan teron, centmiloj la malajzianoj aŭdis pri esperanto, kelkcent komencis studi la lingvon kaj kelkdek vere fariĝis esperantistoj. Naskiĝis movado en nova lando.

Rumanio reviviĝas

Pri Rumanio ni ne povas skribi ke naskiĝis nova esperanto-movado, ĉar Rumana Esperantista Socio fondiĝis jam en 1907. Dum multaj jaroj ĝi tamen tute ne povis labori pro la diktaturo. Tiam tamen ekzistis unuopaj esperantistoj en la lando.

Ĉi-jare REA refondiĝis. Ĝi jam aktivas en pluraj lokoj en la lando. UEA organizis monkoklektadon por REA. Ĝis oktobro la rezulto estis pli ol 10500 svedaj kronoj, sed pliaj kontribuoj estas bonvenaj.

Korespondaj lingvokursoj

Hungara Esperanto-Asocio aranĝas korespondan lingvokurson por esperantistoj en ĉiuj landoj, kiuj volas plibonigi sian lingvokonon. Pliaj informoj donas: Hungara Esperanto-Asocio, H-1369 Budapeŝt, Pf 193, Hungario.

BERGEN 1991

Nu kan du anmäla dig till nästa års UEA-kongress i Bergen 27 juli-3 augusti 1991.

Kongressavgiften i svenska kronor:

	Till 1990-12-31	Till 1991-03-31	Från 1991-04-01
1. Direktmedlem i UEA (DM, MJ och MA)	585	745	895
2. Ej direktmedlem i UEA	730	895	1045
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1991-01-01) som är direktmedlem i UEA	295	450	600
4. Medföljande, handikappad eller ungdom som själv inte är direktmedlem i UEA	440	600	745

Beställ anmälningsblankett hos **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 HÖRBY**, tel: 0415/50 152. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till **pg 14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet, Specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser

(Priserna har fått höjas p g a ändrade valutakurser)

Kalendaro

Aldonoj al la kalendaroj en *La Espero* 1990:4 kaj 1990:5.

DECEMBRO

21-22: 9-a Landa Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio, Moskvo (SEU-kongreso, Esperanto, ul. Volhonka 13, SU-121019 Moskvo, Sovet-Unio)

27 decembro - 3 januaro:

Internacia Seminario de GEJ, Finnentrop, Germanio (Matthias Funke, Carl-Duisberg-Centrum, Mecklenburgring 1, D-W-6600 Saarbrücken 3, Germanio)

29 decembro - 4 januaro:

12-a Novjara Junulara Renkontiĝo, Zakopane, Pollando (Grazyna Mirkiewicz, ul. Hubska 119/34, PL-50-501 Wroclaw, Pollando)

UEA kolektas poŝtmarkojn

por vendi ilin. Tiamaniere UEA ĉiujare gajnas monon, kiun la organizaĵo uzas en la laboro por esperanto. Vi povas helpi al UEA:

- ĉiam uzante belajn poŝtmarkojn skribante al UEA, kaj
- sendante uzitajn poŝtmarkojn sur elŝiritaj leteranguloj al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Dags för medlemsavgiften till UEA

Universala Esperanto-Asocio har för avsikt att skicka ut årsboken för 1991 i två omgångar: I slutet av januari till dem, som då har betalt in avgiften, och i maj till dem, som betalt senare. Det finns alltså all anledning att betala så fort som möjligt.

Som direkt medlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t ex nedsatt kongressavgift för kategorierna MJ, MA och DM. UEA arbetar nu för att komma upp i 9000 direkta medlemmar 1991 och 10 000 1992. Vi svenskar har råd att gå med.

Här är avgifterna för 1991:

MA	medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	250 kr
MJ	medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	100 kr
MG	medlem med den 128-sidiga informationsskriften <i>Gvidlibro</i>	40 kr
SZ	Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd. (Medlemskap ingår ej.)	500 kr
PT	Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej.)	300 kr
DM	ständig medlemskap med ständig prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i>	6250 kr

Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1991 och blir medlem i någon av kategorierna MJ, MA eller DM får även *Kontakto* och *TEJO-tutmonde*. Ange födelsedatum.

Avgiften kan betalas in på postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Streĉa distraĵo en fuŝa traduko

Maj Sjövall & Per Wahlöö:
Roseanna. Tradukita el la sveda de Malte Markheden. Progreso Eldonejo. Motala 1990. 202p.

Roseanna estas la unua el dek krimromanaj kie rolas i.a. Martin Beck. Ili estas streĉaj, sufiĉe realismaj krimrakontoj el la hodiaŭa sveda socio.

En *Roseanna* oni sekvas la serĉadon por trovi la murdinton de juna virino. La aŭtoroj tre lerte streĉas la atenton de la leganto dum ŝajne senventa esplorado ĝis tre drama fino.

En *Roseanna* oni sekvas la serĉadon por trovi la murdinton de juna virino. La aŭtoroj tre lerte streĉas la atenton de la leganto dum ŝajne senventa esplorado ĝis tre drama fino. La traduko de M.M. iuloke estas flua kaj bonstila (ekz. dialogo sur paĝoj 67-75). Sed plejparte ĝi bedaŭrinde estas tute fuŝa. Svarmas gramatikaj eraroj, amasiĝas svedismoj en vortaro kaj sintakso, kaj la stilo entute estas tre maleleganta. Krome M.M. eĉ arogas al si cenzuri kaj ŝanĝi la originalon (sur paĝo 159 li en tri diversaj lokoj ellasis sume 40 vortojn). Li konsekvence misuzas ofero anstataŭ viktimo, de anst. el, direkte, anst. rekte, perono anst. kajo, konfuzas fini kaj ĉesi, malgraŭ kaj kvankam, povi kaj scii, se kaj ĉu, kaj prezentas aron da svedismoj kiel en la ĉemizmanikoj (senjake), faligita malantaŭ vagono (naivega), per propra maŝino (proprapiede) kaj pendi sur la seruro (ĝisatendi la horon de malfermo). Multaj eraroj kaj malglataĵoj evidente fontas en tio ke M.M. tradukis vorton post vorto ne zorgante pri la kunteksto.

Sume mi povas rekomendi *Roseanna* al homoj kiuj ŝatas streĉan distraĵon se ne zorgas pri eleganta aŭ klara lingvo. El pure lingva vidpunkto mi ĝin rekomendas nur al esperantologoj kiuj volas aparte studi svedismojn.

Sten Johansson

Bona libro pri bona lingvo

Claude Piron: *La bona lingvo. Eldonejo Pro Esperanto. Vieno 1989. 117p.*

Malpli ol unu procento de la esperantistaro estas anoj de diversaj lingvaj skoloj. Ili opinias ke estas absolute necese ŝanĝi aŭ "plibonigi" esperanton. Laŭ la eŭropismaj (naturalismaj) skoloj estas necese enkonduki amason da eŭropaj vortoj por plisimiligi esperanton al eŭropaj lingvoj. Alia tendenco ĉe kelkaj reformemuloj estas sendisciplina kaj arbitra enkonduko de novaj afiksoj.

Claude Piron male per sia majstraĵo *La bona lingvo* montras ke la normala esperanto estas la plej bona esperanto, simple ĉar ĝi estas lingvo vivanta kaj uzata, kiu ŝanĝiĝis kaj evoluis, ne laŭ la opinioj de unuopaj "plibonigantoj", sed laŭ la spontanaj decidoj de la amasoj.

La verkinto per pluraj ekzemploj montras ke riĉas la lingvo de ordinara lingvouzantoj, ekz.: "Mi ne estas tre orema", (t e "ema aĉeti orajojn"). Jen subita invento de tute nova, eble neniam antaŭe uzita, sed tuj komprenebla kunmetaĵo. Centoj aŭ miloj de tiaj spontanaj kreaĵoj ekestis, ĝuste ĉar tio estas laŭ la spirito de esperanto.

Piron defendas ankaŭ la afiksansistemon. La iam kritikata *mal-* estas vige kaj senprobleme uzata, ofte eĉ humure, ekz.: *Kiam okazos la malinaŭguro?*

Kiel psikologo, Piron ankaŭ interesiĝas pri la rolo de la dekstra kreema kaj maldekstra analiza duonsferoj de la homa cerbo rilate al la lingvouzado; interesa diskuto, kiun mi ne povas koncizigi en tiu ĉi recenzo.

Aliaj temoj traktitaj en la libro estas ekzemple: la signifamplekso de vortoj en diversaj lingvoj, timo

malprecizi. la arto de vortfarado, la rilato inter poezia kaj ĉiutaga lingvoj.

La verkinto diskutas ankaŭ la terminojn naturalismo kaj skemismo, kaj proponas anstataŭigi ilin per eleksterismo kaj elinternismo, terminoj kiuj estas pli bona priskribo de la vera signifo.

La bona lingvo estas libro leginda de ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri sia lingvo. Ĝi estas unu el la plej gravaj libroj pri la lingvo esperanto, kiuj iam aperis. Ĝi estas grava parto de la debato pri esperanto, kaj ankaŭ inspiras la legantojn plibonigi sian lingvo-uzon. Aĉetu ĝin! Legu ĝin! Guu ĝin!

Leif Nordenstorm

Vjetnama interesaĵo

Post la inundo. Novelaro. El la vjetnama tradukis: Thuy Minh Ngoc. *Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1988. 117 p.*

Tiu ĉi libreto enhavas tri modernajn vjetnamajn novelojn. Ĉiuj tri diversmaniere traktas la sekvojn de la milito por diversaj homoj. Kamparano sukcesas havigi kokidojn dank al' siaj dummilitaj kontaktoj kun la nun potenca S-ro Nam. Medicinaj studentoj iras al la kamparo por labori, sed sentas nostalgion. En la komunumo Ky Son oni ankoraŭ baraktas kontraŭ la minoj de la milito.

La libro enhavas aron da presaj kaj lingvaj eraroj. "...skribigi al li kelkajn vortojn je via adreso kiel ekspliko" (p. 11) devus esti kiel eksplikon. "Oni mankas ĉion" (p. 68) devus esti ĉio mankas aŭ oni sentas mankon de ĉio.

Pro la eraroj komencantoj kaj studrondoj ne legu la libron. Mi tamen rekomendas la libron al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri literaturo. Moderna vjetnama literaturo estas preskaŭ tute nekonata inter ni svedoj. Do, utiligu vian scion de esperanto. Aĉetu tiun ĉi malmultekostan perlon.

Leif Nordenstorm

Sten Svenonius
Erikstorpsgratan 26 A
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Ni ne peras korespond-petojn!

La redaktanto de *La Espero* kaj la estraranoj de SEF de tempo al tempo ricevas petojn pri helpo korespondi. Ni tamen ne povas helpi pri tio.

Se vi volas korespondi skribu al *Koresponda servo mondiskala*, S-ro Robert Llorens, Les Hortensias 2, 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Skribu al la servo donante jenajn detalojn: Nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. La servo kutime ne agnoskas ricevon de via peto, sed tuj pludonas viajn informojn al jam registrita(j) korespondemulo(j) kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi devos do ricevi leteroj(n) rekte de iu(j) korespondemulo(j). Se post kelkaj semajnoj tio ne okazis, vi skribu denove al KSM por plia provo.

Aĉetu du internaciajn respondkuponon en poŝtoŝtanco, kaj kunsendu ilin.

Ni deziras al vi bonan korespondadon.

Medlemsavgift 1991

Nu är det dags att betala medlemsavgiften till Esperantoförbundet för 1991. Ni som är anslutna genom någon esperantoklubb betalar som vanligt till klubbens kassör.

Ni som är direktanslutna till förbundet betalar 125 kronor (ungdomar t o m 20 år och familjemedlem utan tidningen *La Espero*: 50 kronor). Betala till Esperantoförbundet, postgiro 20 12-3. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte skulle få den, meddela ditt födelseår på postgirotalongen.

Bonan Kristnaskon kaj Prosperan Novan Jaron 1991

deziras al vi ĉiuj la estraro de Sveda Esperanto-Federacio.

Ni dankas pro bona kunlaboro dum 1990 kaj esperas ke ankaŭ dum 1991 ni kunlaboru por antaŭenigi esperanton.

Karin Lindquist, Märtha Andréasson, Ulla Luin, Börje Andersson, Kerstin Rohdin, Bertil Andreasson, Haldo Vedin, Per Aarne Fritzon, Leif Nordenstorm.